

11^a jaro

ESPERANTO

1904



LINGVO INTERNACIA HELPA

JUNA ESPERANTISTO

Organo internacia de l'junaj Esperantistoj

*REVUO INTERNACIA POR GEJUNULOJ, ELIRANTA
SESONJARE*

Organo oficiala de l'Internacia Korespondado de junaj Esperantistoj

Kosto de la abono por jaro : 2 frankoj

Personoj kiuj pagos almenaŭ 5 fr. estos protektaj abonantoj, kaj havos sian nomon sur nia revuo.

Postmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{2}{3}$ de ilia valoro.

Pago por anoncoj :

| | | | | |
|-------------------------|--------------------|---|-------------------------|-------|
| $\frac{1}{8}$ da pago : | 1 fr. 50 centimoj. | — | $\frac{1}{4}$ da pago : | 3 fr. |
| $\frac{1}{2}$ » » | 5 » 50 » | — | 1 tuta » | 10 » |

Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendas

REDAKCIO & ADMINISTRACIO

9, Avenue des Vollandes, GENÈVE (Svislando).

EDMOND PRIVAT, Dir.

HECTOR HODLER, Red.

700.013 - C Period.

LEGU: p1, l. 19 esperantistajn gejun.
p2, l. 15 pensojn. - p3, l. 5 aĵi ili. p3,
l. 16 interesajn. - p7, l. 16 publikigis

11^a Jaro
1904

N^o 1^a

Januaro.
1904

JUNA ESPERANTISTO

9 Av. des Vollandes - Genève (Svisujo)

Redakcio:

Edmond Privat | Hector Hodler



Enhavo de l' N^o 1^a.

AL NIAJ LEGANTOJ.

Nia Celo - Esperanto inter junularo.

Enhavo de nia revuo.

ESPERANTO EN JARO 1903^a.

LITERATURA PARTO - Hinda fabelo.

SCIENCA PAĜO - Lastaj eltrovoj.

BIBLIOGRAFIO.

INTERNACIA KORESPONDADO (I.K.J.E.).

Avizo grava..

Ni petas cium personojn dezirantajn aboni, kiuj
ne ankoraŭ sendis al ni sian abonpagon, ke ili faru
tion plej eble kiel baldaŭ.

Ĉiuj samideanoj konantaj esperistajn junulojn bon-
voluofable sendi al ni iliajn adresojn!

AL NIAJ LEGANTOJ

Nia celo.

Tiu ĉi modesta revuo, kiu aperas hodiaŭ, celas: propagandi Esperanton ĉe l' ĉiulandaj gejunuloj, kuraĝigi ilin por lerni tiun ĉi lingvon internacian, interesi ilin je l' esperantista movado, havigi al ili per Esperanto utilajn kaj amuzajn okupojn kaj krei inter ili amikan ligilon.

Esperanto por junularo.

Ekzistas en ĉiuj landoj multaj por gejunuloj revuoj, kiuj celas grandigi iliajn konceptojn kaj versmaniere instrui kaj amuzi ilin. Sed kiuj gazetoj povas nur utili al samlandanoj pro diversco de lingvoj kaj gejunuloj preskaŭ tute ne povas havi rilatojn kaj interesprimi siajn ideojn kaj pensojn kun fremdaj samaĝuloj. Sed nun, ni havas, kreitan de l' eminenta D^{ro} Zamenhof, lingvon internacian kiu ĉiutage pli kaj pli disvastiĝas en la tuta mondo kaj per kiu ĉiulandaj homoj interkompreniĝas kaj korespondas.

Interkomunikilo ekzistas kaj vivas. Kial do la ĉiulandaj junuloj ne ĝin uzas? Per Esperanto, ili povas korespondadi inter si, konatiĝi kun moroj, vivo de l' popoloj, malgraŭ la naciaj bariloj kaj malhelpoj al la kunfratiĝo de l' koroj.

Junularo por Esperanto.

Ĝis nun oni ne instigis propagandon inter junularo,

tamen estas movado kin certe estos plej utila al Esperanto ĉar ĉefe al junularo apartenas entuziasmo kaj el ĝi venos la venko! La junaj esperantistoj iĝos pli malfrue plej fervoraj apostoloj de nia afero: al ĝi l'estonto! Ĉial oni devas fari ĉion eblan por kuragiĝi tiun movadon kaj tion ni faros!

Enhavo de «Juna Esperantisto».

Kia estos la enhavo de kin internacia revueto, de l' unua por junularo gazeto redaktata en lingvo artefarita? Kiel eble ni havos ĉefartikolon preparolantan esperantan aferon. Poste ni donos sufiĉe gravan lokon al kroniko esperantista, kin estas temo interesa kaj diversa. Literatura parto enhavos prozaĵojn kaj versaĵojn. Ni ĉiam havos sciencon artikolon kaj ankaŭ eble geografian. Ni donos klarigojn kaj respondojn interajn kaj bonajn demandojn pri gramatiko, sintakso kaj afiksoj de Esperanto! Ĉindumonate estos organizata ia konkurso kaj ni faros rimarkojn pri eblaj eraroj lasitaj en la laboroj ricevitaj. Ni havos esperantan bibliografion, en kin ni anoncos ĉiun novan verkon, kies ni estos ricevintaj ekzempleron. Fine, krom diversaj aliaj artikoloj interesaj por junularo, ni publikigos ĉiam la novajn aliĝojn al «Internacia Korespondado de J.E.», kies nia revuo estas oficiala organo.

!Krom la proponoj de sangoj al la lingvo, kiujn ni kompreneble ne impresos nek preparotos.

Tri enhavo de nia revuo, se niaj legantoj afable volos sendi al ni bonajn novajn ideojn, ni estos al ili dankaj.

*

*

*

Samideanoj! Amikoj! Por ke nia revuo povu esti bona propagandilo inter tutmonda junularo, subtenu nin, varbu abonantojn! Nia sola espero de sukceso estas via helpo al kiu ni konfidas.

Kaj nun antaŭen, al la celo!

Edmond Privat

Hector Hodler.

MOVADO ESPERANTISTA.

Esperanto dum jaro 1903.

Estas ĉiea kutimo rigardi kiam finiĝis la jaro, okazintaĵojn, batalojn, progresojn efektivigitajn en la historio de la homaro dum ĉi tiu tempo.

Tiu rigardo malantaŭen estas por ni, Esperantistoj, plej grava; ĝi fortigas nin por la estontaj bataladoj kaj esperigas al ni la pli kaj pli proksiman triumfon de nia kara afero.

Estus tro longe denombri detale ĉiujn progresojn fakitajn dum ĉi tiu jaro. Ni nur citos la ĉefajn faktojn okazintajn tra la mondo esperantista.

Francujo. En tiu lando, disvastiĝo de Esperanto estas plej grava kaj ĉi superas la esperojn de la plej postulernaj. Dank'al multaj paroladoj, dank'al la senĉesa agado de niaj samideanoj en la gazetaro

Kaj al la helpo de diversaj societoj (kiel Ĥuring-klubo), nia lingvo estas konata en ĉiuj lokoj de tiu lando, kie fondiĝas prosperaj grupoj, kiuj organizas publikajn kursojn, ĉiam akurate aŭdatajn. Ekzistas nun en Francujo pli ol 30 grupoj; en Parizo sole estas organizitaj 30 ĉiusemajnaj kursoj. La propagando en Francujo estas lerte direktata de la Societo f.p.p. Esperanto kiu havas nun ĉirkaŭ 2500 anojn; ĝia bonega organo «L'Esperantiste» alportas al ni ĉiunmonate la ĝojigajn sciigojn pri la progreso de nia afero tra Francujo.

Belgujo - Esperanto rapide propagandiĝis en tiu lando, kie movado estas nun tre grava. En dek urboj ekzistas agemaj grupoj; kelkaj el ili organizis, kiel en Francujo, ekspoziciojn, kiuj plene sukcesis. «Belga Sonorilo», organo de l' belgaj grupoj, komencis en monato septembro sian duan jaron de fervora laboro, kies rezultataj estas plej kuraĝigaj.

Holando - La gazeto «Holanda Pioniro» klopode batalas. Ĝia laboro estas ofte malfacila, sed esperinde per helpo de ĉiuj, ĝi sukcesos starigi seriozan movadon en Holandon.

Anglujo - Ekaliĝo de tiu lando al Esperanto, progresoj de nia ideo ĉe tiu popolo estas nun el la plej gravaj faktoj de ĉi tiu jaro. Oni memore ke antaŭ 1903 estis nur kelkaj izolitaj esperantistoj. Nun danko al agado de sindonemaj samideanoj kaj speciale de l' para gazeto «Review of Reviews», nia afero stariĝis en tiu lando. En 12 urboj fondiĝis grupoj kaj organiziĝis kursoj; jam multaj gazetoj estas tre favoraj al Esperanto;

fine ĵus aperis en novembro unua numero de l' angla esperantista organo «The Esperantist». Se Esperanto sukcesos en tiu lando - kaj la rezultatoj jam efektiviĝitaj - tion certigas al ni - estos granda profito por nia afero. Tial ni devas niaforte albaŭdi kaj kuragigi la anglajn samideanojn.

Germanujo. Ekzistas nur unu grupo (Kiel, Glatz, Berlin) en tiu lando, kies aliĝo estus tamen tiel grava por nia sukceso. Sed ni esperas ke baldaŭ la propagando estos pli facila, dank'al la apero de bonaj lernolibroj kaj propagandaj broŝuroj, kaj dank'al energia batalado de kelkaj esperantistoj, kiuj dediĉis sian tutan agemon al la sukceso de nia lingvo en Germanujo.

Svedujo. En tiu lando, kie Esperanto jam de longe estas konata, fondiĝis gazeto «Monata revuo esperantista», kiu esperinde kreskos kaj helpos al la unuiĝo de l' svedaj samideanoj.

Danujo. Tie la propagando komencas kaj estos faciligata per apero de novaj lernolibroj.

Rusujo. Malgraŭ multaj malhelpoj al la propagando, Esperanto daŭrigis siajn mirindajn progresojn. Tie ne estas multe da grupoj (so gr. de l' societo «Espero»), sed precipe esperantistoj izolitaj en ĉiuj lokoj eĉ plej malproksimaj ĝis en Siberujo. Divastiĝo de nia lingvo en Rusujo estas jam tiel grava ke kelkaj samideanoj povis vojaĝi facile tra tiu lando, nur dank'al Esperanto.

Aŭstrujo. Jen estas unu el la plej aktivaj

landoj en la esperantistaro. Ni ĵ samideanoj fondis en Praha, Brno kaj Vien prosperajn grupojn kaj interesan ĵurnalon «Bohema Esperantisto». En Hungario, Esperanto ekdisvastiĝas; grupo fondiĝis en la ĉefurbo Buda-Pesth.

Bulgario - Ni ĵ amikoj estas tie despli agemaj. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, malgraŭ la neregula vivado en tiu lando pro la macedonaj okazintaĵoj, marto estas nun mirinde grava. En preskaŭ ĉiuj urboj ekzistas grupoj, kiuj organizis kursojn aŭdatajn de diligentaj lernantoj, pli kaj pli multaj. La klubo Stelo en Plodiv eldonas la gazeton «Randiranto», kiu estas fervora, vivoplena organo kaj bonega ilo por tiea propagando. Bulgara gazetaro estas tre favora al Esperanto; kelkaj publikaj jam kronikon pri nia lingvo.

Italio - La grupoj esperantistaj kuniĝis en nacia societo p.p.e.. Tiu societo prenis sur sin la direkton de «L'Esperantista», kiu jam de kelka tempo sole bataladis.

Svisujo - Sukceso de Esperanto en tiu lando estas ankoraŭ vime el la gravaj faktoroj de tiu ĵaro. Intaŭ 1903 ekzistis en Svisujo preskaŭ nenio. En konvenco de 1903 fondiĝis per iniciato de kelkaj samideanoj, Svisa Esperanta Societo. La ĝenerala kunveno de tiu societo en septembro monato ke ĝi estas jam tre aktiva kaj certe progresos. «Svisa Espero» estas la nomo de l'modesta, sed tie bone direktata svisa organo. En 4 urboj de l' franklingva Svisujo fondi-

ĝis grupoj. Devo de l' S.E.S. estas nun varbi german-lingvan Svisujon.

Hispanujo. Kelkaj grupoj fondiĝis en ĉi tiu lando kaj dank'al la penoj de miaj kiaj amikoj, organo aperis sub titolo: «Suno hispana», al kiu ni deziras plej bonan sukceson.

Kanado. Se ni nun transiras la marojn, ni vidas ankoraŭ prosperajn landojn. En Kanado, la-
talas energie «La Suno» kaj la rezultatoj de ĝia agado estas plej ĝojigaj.

En Peruo, fondiĝis societo kun organo «Antaŭen Es-
perantistoj!». Same okazis en Ĉilio, kie modesta ĵur-
nalo «Ĉilia esperantisto» estas senpage disdonata.

En aliaj landoj kiel Egiptujo, Algerujo, kelkaj gazetarta-
koloj konigis nian lingvon. Fine en Japanujo ekzis-
tas-lau letero ricevita de L.I. - kelkaj grupoj.

(daŭrigota).

H. HODLER.

PARTO LITERATURA

Hinda fabelo.

Kamelisto, iam trapasante arbaron, ekvidis voje profundan fosaĵon, faritan de la viraĝanoj, en ki-
un tigro estis falinta. Li alpaŝis la fosaĵon kaj
vidis la tigron kiu saltigadis ne sukcesante atingi
la enirejon de la enfalejo.

Vidante lin, la tigro diris: «Bonfarema homo, mi

senatente falis en ĉi tiun truon, kie mi mortas pro malsato kaj soifo. Helpu min por eliri kaj mi ĵuras ke neniam mi atencos vin aŭ vian bestojn.

La Kamelisto, naiva kaj bona, kompatis al la tigro kaj metinte dikan branĉon en la fosajon, li ĝin helpis por eliri. Apenaŭ ĉi tiu estis ekstere, ĝi blekis kaj diris al la Kamelisto: « Pro la peko de viaj similuloj, mi doloras pro malsato de tri tagoj; tial estos juste ke nun komencas, por min refortigi, manĝante vin ».

La Kamelisto ekstremis de teruro; kaj genuflexante antaŭ la tigro, li diris: « Nobela signoro, mi kredas vian promeson kaj mi liberigis vin; kaj nun vi volas min manĝi! Eble, mi estas efektive kulpa kaj mi devas suferi pro la pekoj de miaj similuloj. Tamen, tio, kio ŝajnas al vi justa, tio ŝajnas al mi maljusta. Ĉu mi ne parus, antaŭ decidi, pri la opinion de vi. La tri unuaj bestoj, kiujn mi renkontas, estas miaj ĵugantoj.

— Bone, diris la tigro, mi atencos ».

Ili do ekvojaĝis kaj kiam ili estis elirintaj el la arbaro, ili ekridis ~~ĉirkaŭ~~ kamelon. La Kamelisto tute ĝoja rakontis al ĝi sian aventuron.

« Estas juste ke la tigro vin manĝu, diris la Kamelo. (daŭrigoto).

Lastaj eltrovoj.

Kiom da progresoj efektivigitaj dum ĉi tiuj lastaj jaroj en la scienco; kiom da eksterordinaraĵoj faritaj en mallonga tempo! Mi ne intencas klarigi plene la lastajn eltrovojn, mi nur deziras paroli pri la plej interesaj praktikaj. Ni unue salutas admire la elpensadon de l' fama Marconi, la senfadena telegrafo. Admirinda estas tiu aparato elanta neigi spacon kaj tempon sen la kosta kaj nepraktika helpo de l' metal-fadenoj kondukantaj. Alia elpensado, kiu vere ne donis ankoraŭ rezultaton tiel perfektan kiel oni dezirus, estas la aerveturado. Jam multe ni ŝuldas al Giffard, Santos Dumont, Severo, Lebaudy kaj aliaj; lastaj eksperimentoj de Lebaudy jam antaŭentigas al ni solvo de tiu grava problemo, sed la definitiva venko ŝajnas esti al la pli pezaj ol aero aparatoj. Ni tiros kelke da vortoj pri rapidaj vagonaroj, kiuj baldaŭ travtrairados Eŭropon; antaŭ nelonge elektra lokomotivo atingis ĝis fenomenala rapideco po 207 kilometroj en horo, sed praktike oni ne povas superi 150 k. ne riskante tro oftajn malfeliĉojn. Fine ni nomos aliajn elpensadojn, kiel fonografo, telektroskopo, radioj kaj diversaj plibonigoj de l' elektra lumo kaj de l' telefono.

En sekvantaj artikoloj, ni parolos pli detale pri ĉiu el ĉi tiuj teroj.¹

MARCEL MINOD, gimnaziano.

¹La aŭtoro, kies adreso estas 31 rue de Malagnou 31. Genève (Svisujo) plezure respondos ĉiujn demandojn pri scienco kaj speciale fiziko.

Unua Adresaro de niaj protektaj abonantoj.

(abonoj ricevitaj ĝis 15^a decembro).

- S^{ro} E. Ducommun, instr. Loche (Svisujo).
 „ Ch. Lemaire, komandanto (Kongo)
 „ Jos. Jamin, red. «Belga Sonoro». Bruxelles (Belgujo).
 „ Th. Renard, sek. S. e. s. - Vieux Collège - Genève (Svisujo).
 „ Marcel Minod, gimnaziano - Malagnoux 31 - Genève „
 „ P^{ro} Th. Cart, 12 rue Soufflot. Paris (Francujo).

Al tiuj afablaj subtenantoj, esprimon
de nia plej sincera kaj profunda danko!

UNUA KONKURSO.

Ni petas ĉiujn niajn junajn gelegantojn ke ili faru kaj sendu al ni priskribon de sia urbo, vilaĝo aŭ ĉirkaŭlandaĵo kaj de ĉi-moroj, kutimoj de la loĝantoj. Oni faru tiun laboron sur un paĝo (formato de nia revuo) kaj sendu ĝin antaŭ la 1^a de Februaro al nia redakcio (9^a av. Vollandes - Genève (Svisujo)).

Ni esperas en «Juna Esperantisto» kelkajn el la plej bonaj laboroj kaj al la aŭtoro de la plej bona, ni sendos kiel premion belan esperantan ilustritan libron.

Ni esperas ke ĉiuj niaj junaj amikoj bonvolos partopreni en tiu utila kaj interesa konkurso.

Konigu nian aferon al ĉiuj junuloj!

BIBLIOGRAFIO

Esperanta Sintakso.

Laŭ verkoj de D^{ro} Zamenhof kaj aliaj, verkita de S.
Fructier, ĉefredaktoro de Lingvo Internacia. Ni ricevis
ekzempleron de ĉi tiu bonega verko, kiu estas plej uti-
la por esperantaj tradukistoj aŭ verkistoj. Ĝi perne-
sas al ĉiuj akiri neriproĉindan stilon laŭ la mo-
deloj verkoj de nia literaturo. Ni ĝin rekomendas
varmege al ĉiuj.

Ricevebla po 1 fr. 50 ĉe S. P. Fructier 27. B^o. Arago. Paris
aŭ ĉe S. P. de Lengyel - Szekszárd (Hungario)

«L'Esperanto en 10 leçons» (E. en 10 lecionoj) de S. P.
Th. Cart - Hachette et C^o. Kosto. 0,75 fr.

Kvara eldono de ĉi tiu plej praktika lernolibro por
francoj eliris kun kelkaj ŝanĝoj. La aŭtoro revenis al la dis-
tingo de S. de Beaufront en la «Commentaire» inter deter-
minaj adjektivoj kun u (persono, individuo) kaj a kvalito
anstataŭ pronomoj kaj adjektivoj. Oni presis jam 17000
ekz. de tiu verko; ĉi tiu sciigo estas sufiĉe bona rekomendo.

«Holanda Pioniro» petis min anonci ke ĝi estas, dum
daŭra tempo, kvaronjara 32 paĝa revuo, precipe en Esperan-
to. Jara abono: 3 fr. Ĉi tiu al S. Hitterdijk en Hilversum
(Holando).

AMUZAĴO

Juna krietigisto, donante prezentadon kun leono, basis ĝin premi
per la brisego, pecon da sukero, kion li tenis inter siaj dentoj.
-Mi parus fari samon! ekiris ridante - «Ĉu vi kuragus?» deman-
dis la krietigisto - «Sendube, mi farus tion tiel bone kiel la leono!»

INTERNACIA KORESPONDADO de Junaj Esperantistoj (I.K.J.E)

Regularo:

1° Por kuraĝigi la gejunulojn kaj infanojn, kiuj lernas Esperanton, fondiĝis sub titolo I.K.J.E du grupoj da ĉiujlandaj Korespondantoj.

Grupo da Knaboj kaj grupo da Knabinoj.

2° La junaj Korespondantoj havas tiel intersanĝi poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn, fotografiaĵojn, k.t.p. Ili devas korekti reciproke, laŭ scio, siajn erarojn, por ke tiamaniere Korespondado estu utila al ili por lernado de Esperanto.

3° La enskriboj estas senpagaj. Por aliĝi oni devas sendi al S. Ducommun, inst. Locle (Svisujo) aŭ al «Juna Esperantisto» sian nomon, adreson, jaron de naskiĝo, sekson.

4° Aliĝante oni devas promesi respondi ĉiujn Korespondadojn ricevotajn de l'anoj de I.K.J.E.

5° Por ricevi plenan adresaron de l'anoj de I.K.J.E, oni volu sendi al unu el du suprenomitaj adresoj poŝtmarkon de 25 centimoj aŭ pli bone, oni abonu la revuon «Juna Esperantisto», kiu publikigas en ĉiu N° la novajn aliĝojn (jara abonkosto de J.E. 2 frankoj).

N. Ĉiu Korespondanto havas numeron. La Knaboj havas la reparnumerojn (1, 3, 5, 7, k.e.) kaj la Knabinoj la parnumerojn (2, 4, 6, 8, k.e.).

PLENA ADRESARO DE I.K.J.E

(aliĝoj ricevitaĵ ĝis 15^a de decembro 1903^a).

[numero - Naskiĝo - Komo - Loko - Urbo - Lando]

A. Grupo de Knaboj.

- N^o 1 - Knabo 1892 - Felix Ducommun - ĉe S^o Ducommun.
Le Locle (Svisujo).
- N^o 3 - Knabo 1892 - Frederic Jeanjaquet - Monto 641.
Le Locle (Svisujo).
- N^o 5 - Knabo 1889 - Brajko Predkar - Rue «HendeK» 15.
Plovdiv (Bulgarujo).
- N^o 7 - Knabo 1889 - Gustave Humbert - Monto 652
Le Locle (Svisujo).
- N^o 9 - Knabo 1893 - Fritz Droz - Monto 649 -
Le Locle (Svisujo).
- N^o 11 - Knabo 1889 - Edmond Privat, ĉef «Juna Esperantisto»
9 Av. des Vollandes - Genève (Svisujo).
- N^o 13 - Knabo 1885 - Алексею Алексеевичу Гориславскому
44 Aprm. Spurada - Воронцовское Городище - Киевская губ. (Rusujo)
- N^o 15 - Knabo 1888 - Hector Hodler, red «Juna Esperantisto»
3 Av. des Vollandes - Genève (Svisujo).
- N^o 17 - Knabo 1888 - Dimitri Kassatkine - 8 Rue de l'Ecole
de médecine - Genève (Svisujo).
- N^o 19 - Knabo 1888 - Marcel Minod - 31 Rue Malagnon
Genève (Svisujo).
- N^o 21 - Knabo 1889 - Ростиславу Никодимовичу Кипарисовичу
Калужское переулок - Вязьма - Смоленская губ. (Rusujo)
- N^o 23 - Knabo 1887 - R. Jaschte - Konvikt.
Glatz - Schlesien (Germanujo).

- N°25 - Knabo 1887 - Walther Beck - Konvikt.
Glatz - Schlesien (Germanujo).
- N°27 - Knabo 1887 - A. Stiller - Konvikt.
Glatz - Schlesien (Germanujo).
- N°29 - Knabo 1887 - E. Hauck - Konvikt.
Glatz - Schlesien (Germanujo).
- N°31 - Knabo 1887 - J. Weizel - Konvikt.
Glatz - Schlesien (Germanujo).
- N°33 - Knabo 1888 - Jos. Flaujat - B² Madeleine 200.
Marseille - (Francujo).
- N°35 - Knabo 1888 - J. Gaillard - B² de la Liberté 34 -
Marseille - (Francujo).
- N°37 - Knabo 1888 - Paŭlo Viala - 5 Rue Violet - le Luc
Narbonne - Aude (Francujo).
- N°39 - Knabo 1889 - Adolfo Dumont, 2^e P^o Dumont,
piaggiisto - Pamoens - H^{te} Savoie (Francujo).
- N°41 - Knabo 1886 - Edmond Buet - Ch. des Lentillères
Dijon - Côte d'Or (Francujo).
- N°43 - Knabo 1888 - Theode Saint-Martin - 79
rue P^e Christophe - Montreal (Kanado).
- N°45 - Knabo 1890 - Oscar Milot - 192 P^e Denis -
Montreal (Kanado - Ameriko).
- N°47 - Knabo 1889 - Charles Guiraud - 7 rue Charras
Narbonne - Aude (Francujo).
- N°49 - Knabo 1892 - Pierre Guiraud - 7 rue Charras.
Narbonne - Aude (Francujo).
- N°51 - Knabo 1893 - Bohumil Píckový - Nádražní
ulice - Brystřice Hostýn - Moravio (Austrijo).

Nº 53. — Knabo 1888 — František Chvatík —
Bystřice Hostýn — Moravio (Aŭstrujo).

Nº 55 — Knabo 1891 — František Tábořský
Bystřice Hostýn — Moravio (Aŭstrujo).

Nº 57 — Knabo 1887 — Kvítek Narcis, studento.
Holešov — Moravio (Aŭstrujo).

B. Grupo de knabinoj.

Nº 2 — Knabino 1891 — Julie Dubois — Chapelle 6.
Le Locle (Svisujo).

Nº 4 — Knabino 1892 — Blanka Oreškova
G. Oreškov — Plavdiv (Bulgarujo).

Nº 6 — Knabino 1890 — Louisa Huguenin
Lotards 635 — Le Locle (Svisujo).

Nº 8 — Knabino 1891 — Blanche Diacon — Monts 656.
Le Locle (Svisujo).

Nº 10 — Knabino 1894 — Nelly Ducommun, 8e S.
E. Ducommun, inst. — Locle (Svisujo).

Nº 12 — Knabino 1890 — Екатерина Евревна Каварева
Комарево Слобода — Вязьма Смоленская губ. (Rusujo).

Nº 14 — Knabino 1892 — Berthe S^{te}. Martin
79. B^{te} S^{te}. Christophe — Montreal (Kanado).

Grupo de Junaj Esperantistoj en Genevo, de-
ziras ricevi kelkajn poŝtkartojn de ĉiulandaj
junaj esperantistoj. Ĉiam respondos.

Adreso de l' grupo:

9 Avenue des Volandes 9. Genève (Svisujo).

